# „... mi estis fremdulo kaj vi gastigis min.”

*Prelego en Révfülöp, 2019*

Fremdulo, ekzilito, enmigrinto, tiuj vortoj plenigas niajn televidajn ĵurnalojn.
Mi proponos al vi rigardon al nia temo per kalejdoskopo.
Mi trairos de la historio al nia nuna situacio, poste mi provos kompreni la ekziliton, la loĝanton, la akceptanton, analizi la sociologian fenomenon de la propeka kapro, rigardi la parolon kaj agadon de la eklezioj, esplori la ligojn inter kristanismo, kulturo kaj politiko, serĉi en la Biblio kion ĝi indikas al ni, kaj fine kio povas kaj devas esti nian engaĝiĝon kiel kristanoj.

Neniam estis tiom da fremduloj sur la Tero. Tio estas paradoksa diraĵo de la batalantoj por akcepto de rifuĝantoj. Ĝi indikas plurajn verojn, ke neniam tiom da homoj estis por diversaj kialoj devigitaj forlasi sian hejmon, kaj ke sur la Tero, ĉiu estas terano, do neniu estas fremda al la Tero. Multaj devas forlasi sian hejmon kaj samtempe ĉies hejmo estas la Tero.

Tamen, inverse, krom eble kelkaj grupoj en Afriko, necerte, ĉiuj homaj grupoj venas de alia loko ol la origino de la homaro. Ni ĉiuj estas posteuloj de migrintoj, en prahistorio, en Antikvaj tempoj, en Meza epoko aŭ en modernaj periodoj ĝis nun. Eĉ la grupoj, kiujn en kelkaj landoj oni nomas "la unuaj nacioj", iam venis el alia loko, eĉ povas esti ke ili ne estis la unuaj kie ili vivas nun.

Eĉ en Eŭropo, kiam oni volas identigi la "unuajn naciojn", oni supozas la vaskojn aŭ la sameojn, sed eĉ tiuj venis post aliaj. En la keltaj regionoj oni parolas pri la antaŭkeltoj, kiuj ne estas la prakeltoj. La prakeltoj vivis en la centro de Eŭropo kaj estis devigataj moviĝi kaj alvenis en la regionon de la konstruintoj de la ŝtonaj monumentoj.

Pluraj nacioj konstruiĝis vole nevole per tiu alveno de homoj. Skize estas du sintenoj : la t.n. "melting pot" (mikspoto), apudmetado de diversaj komunumoj, ekzemple Usono, aŭ la integriĝo al laŭ ebla vidpunkto filozofia nacio, ekzemple Francio.

Kio estas ekzilito ? Estas tiu, kiu pro plej diversaj kialoj devas forlasi sian hejmon, familion, kulturan medion. Kompreneble la situacioj tre varias. La kaŭzoj tre varias. Oni povas resume diri ke temas pri malespero kaj espero. Malesperiga estis ties situacio kaj la espero situas aliloke. Ne plu eblas vivi pro vivminacoj, pro morto aŭ murdo de proksimuloj, pro persekutoj religiaj aŭ etnaj aŭ aliaj, pro neeblo vivteni simple. La nura solvo vidata estas foriri al loko kiu aspektas pli promesplena, kie eblos simple vivi.

Pri tiuj migrantoj estas dirataj tiom da malveroj. Ne estas amaso da rifuĝantoj alvenantaj en Eŭropo. Estas ridinda proporcio de ĉiuj rifuĝantoj en la mondo. Fermi la landlimojn ne malhelpas la alvenon, sed faras ĝin pli danĝera kaj kosta.

Dumvoje, la ekzilito renkontas diversajn homojn. Inter ili estas tiuj kiuj profitas la okazon utiligi ilin por laboro kvazaŭ sklava, por seksa ekspluatado, aŭ por akiri el ili monon por kontrabande pasigi al ili landlimon aŭ maron, aŭ oni simple mortigas ilin por la malmulta havaĵo. Sed inter ili estas ankaŭ tiuj, kiuj helpas al ili manĝi, loĝi, pluiri, kiuj permesas al ili esti homo, vaganta homo sed homo.

Ili ankaŭ renkontas aliajn homojn kiuj ne havas principe malbonan intencon, sed kiuj timas.

Tiuj timas ĉar ili mem ne vivas en certigas cirkonstancoj, kaj vidas en tiuj alvenantaj minacon, minacon ekonomian, politikan, sekurecan, kulturan, eĉ religian. Ili vidas minacon en sia memo, en sia identeco. Sed, kiam oni parolas pri identeco, oni parolas pri la difino de si mem. Kaj aperas tiam politikistoj kiuj uzas tiujn timojn por venki. Tiuj ĉi antaŭenmetas supozatan ekonomian minacon, supozatan sekurecan minacon, supozatan kulturan minacon, sed ĉiuj ĉi tiuj minacoj estas mensogaj.

Kiam estas ene de socio grava krizo, ekonomia, sekureca, senca, ekzistas reago kiun sociologoj kaj filozofoj nomis per biblia bildo : la propeka virkapro.
Laŭ kion mi komprenis el la pensado de René Girard, ĉiu homo kaj ĉiu homgrupo funkcias laŭ la mimetisma deziro, t.e. envii, deziri tion kion la alia posedas aŭ deziras posedi aŭ povus deziri posedi. La samo validas inverse, kaj tio kondukas al rivaleco kaj fine al perforto. Tiu perforto minacas la koheron de la socio mem. La socio, la grupo trovas solvon en la formo de tio kion Girard, kaj ne nur li, nomas "propeka virkapro". Tiu estas viktimo de la kolektivo, ekstera al ĝi, kiu kvankam senkulpa pri la problemo, estas akuzata esti la kaŭzo de ĉiuj problemoj kaj malafcilaĵoj. La ofero, la morto de tiu viktimo kvietigas la konflikton, ĝis la sekvonta. Tiu skemo estas trovebla en ĉiuj civilizoj, ankaŭ en la bibliaj rakontoj, sed en ĝi estas agnoskata la senkulpeco de la viktimo kontraŭe al la aliaj mitoj.

Tia situacio troveblas en la situacioj de rasismo kaj naciismo. La respondeculo de niaj malfacilaĵoj, de niaj mankoj, estas la fremduloj, la malsamuloj, kvankam tio kompreneble ne veras. Sed ili nepre estas la kulpuloj, kio ni ne estas. Kaj ili devas esti punataj pro tio. Ni studis en la lernejo pri la naziismo kaj la genocido de la Judoj. Kaj nune estas kelkaj kiuj mortigas ĉu Judojn, ĉu islamanojn, ĉu nigrulojn, ĉu hispanamerikanojn.

Inter la akuzoj kontraŭ la fremduloj estas pliaj krimoj. Tio statistike ne veras. Estas samproporcie krimuloj inter la lokanoj kaj inter la fremduloj. Tio estas facila akuzo, montante al unu kazo por akuzi ĉiujn.

Estas ankaŭ akuzo kontraŭ la feemduloj, foje eĉ en kadro de supozata komploto, nome la "granda anstataŭigo", imago kiu havas neniun realon, kion pruvas la statistikistojn.
Alia imago kara al la akuzantoj estas la "kolizio de civilizoj", analizo de la postkomunisma monda situacio sen prognoza valideco.

Tiuj opinioj kontraŭ la fremduloj ĝenerale kaj la ekzilitoj pli precize feliĉe ne estas dividata de ĉiuj. Ekzistas multaj homoj kaj organizaĵoj kiuj helpas al ekzilitoj kaj fremduloj. Tion ili faras pro diversaj kialoj. Ĉar ili sentas sin homo kiu devas helpi al homo. Ĉar sciante sin amata de Dio ili amas la proksimulon. Ĉar tiu kiu pereas devas esti savata, kiu ajn tiu estas.

Tiaj homoj helpas en administraj formalaĵoj, en jura protekto, en loĝado kaj nutrado, en medicina helpo, kaj ankaŭ en savado el droniĝo en la maro.

Inter tiuj grupoj kaj homoj estas eklezioj kaj kristanoj. Jam en 1989, la ekumena kunveno en Bazelo diris :
*§84, l) Ni petas la ekleziojn rekoni, ke* ***rifuĝintoj kaj gastlaboristoj*** *forlasas sian hejmlandon en kaj ekster Eŭropo aŭ pro tio ke ilia ekonomia situacio estas senespera, aŭ ĉar ili estas viktimoj de politika, socia aŭ religia subpremo. Ni postulas la forigon de ĉiuj restrikcioj kontraŭ tiuj homoj. Ni alvokas ĉiujn Eŭropajn kristanojn, ke ili akceptu ilin kiel fratojn kaj fratinojn kaj laboru por ŝanĝi la leĝojn kaj la publikan opinion kaj konduton por permesi plibonigon de ilia situacio.*

*Krome ni volas atentigi pri la milionoj da* ***rifuĝintoj kaj forpelitoj*** *en aliaj kontinentoj. Ili estas viktimoj de ekonomiaj, politikaj, sociaj, mediaj ŝanĝoj kaj perfortaj situacioj. La Eŭropaj eklezioj kaj kristanoj devus fari ĉion kion ili povas por elimini la profundajn kaŭzojn de ilia mizero kaj por doni tujan helpon.*
*(Paco kun justeco : fina dokumento de la Eŭropa Ekumena Kunveno en Bazelo 15.-21.05.1989, p. 29).*
Mi bona konas la francan situacion. Mi mencios la "Cimade". Ĝi originas en la dua mondmilito. Ĉe la komenco, multaj homoj estis evakuitaj el la landlimaj regionoj, kaj fondiĝis komence protestanta komitato por helpi al ili. Dum la okupacio, ĝi zorgis pli la diversaj kaptitoj, politikaj, judaj kaj aliaj, eĉ partoprenis en kaŝvojoj por fuĝado al sekuraj landoj. Post la milito ili ankaŭ zorgis pri la viktimoj de la milito, ankaŭ pri kaptitaj germanaj soldatoj. Poste, ili zorgis pri la diversaj enmigrintoj, el Nordafriko, el Sudorienta Azio, el Eŭropo, el Sudsahara Afriko kaj nun el Mezoriento, inter aliaj multaj originoj.
Pluraj kristanaj organizaĵoj kontraktis kun la franca ŝtato pri akcepto de ekzilitoj, ĉefe familioj troviĝantaj en rifuĝejoj en Jordanio, Libano aŭ Turkio, el Sirio aŭ Irako, laŭ leĝaj vojoj. Tio nomiĝas la "homaraj koridoroj".
Modeste, mia eklezia paroĥo provizas salonon por lecionoj de franca lingvo, matematiko, ktp. por junuloj, ĉefe el Afriko, kies plenaĝuleco restas pruvenda.
Franca politikisto diris frazon, kiun oni ofte nur parte citas : *Francio ne povas akcepti la tutan mizeron de la mondo,* kaj la forgesata sekvo estas *sed ĝi devas fidele preni sian parton.*
Kion mi citis el Francio ekzistas ankaŭ aliloke. Vi certe konas ekzemplojn.

Delonge estas en la eklezioj debatoj pri la rilatoj inter kristanismo kaj politiko, inter la eklezioj kaj la ŝtatoj. La opinioj de la Reformatoroj kaj de la posteuloj ne ĉiam similis. Luther parolis pri la "du regnoj". Ĉu la kristanoj, ĉu la eklezioj devas envolviĝi en la ŝtataj kaj politikaj aferoj ? Ĉu la ŝtato devas interveni en la ekleziaj aferoj ? Tamen restas kelkaj principoj. La amo al la proksimulo restas petata de la kredanto. La obeo al la leĝo de Dio superas la obeon al la leĝo de la ŝtato. La plenumo de la alvoko por justeco superas la submetiĝon al la homaj instancojn.
Estas daŭre debatoj pri la rilatoj inter kristanismo kaj kulturo. Kiamaniere kristanismo influu la ĝeneralan kulturon ? Kiamaniere ĝi rezistu reciproke ? Kiamaniere distingi la kristanecan kulturon foje ne plu kristanan disde la veraj kristanaj elementoj ? Respondi tiujn demandojn povas eviti la pretendon de kelkaj politikistoj diri la kristanan parolon.

Ni do rigardu al nia fonto, al la Biblio.
Kaj tuj venas rememoroj pri tekstoj kiuj defendas la fremdulon.
En la Torao, Readmono 10:19 : *Amu do la fremdulon, ĉar fremduloj vi estis en la lando Egipta.* Kaj estas paralelaj en la aliaj libroj de Pentateŭko.
La moto de nia kongreso *„... mi estis fremdulo kaj vi gastigis min.”* en la parabolo pri ŝafoj kaj kaproj indikas la samon.
Dum la semajno vi havos la okazon viziti diversajn bibliajn pecojn por pripensi ilin.
Oni devas tamen scii, ke la kunmetado de la Biblio daŭris plurajn jarcentojn kaj ke en kelkaj periodoj estis grava la sankteco de la popolo, aŭ plu ĝuste de la pastraro. Tiam oni insistis pri la disigo de la popolo de Dio disde la aliaj paganoj. Sed eĉ la ekziston de tiuj tekstoj indikas ke la fremduloj estis bone akceptataj.
Restas tamen tiu diro, ke Abraham venis el Ur, kaj estis migranta fremdulo en Kanaano. La popolo estis ekonomiaj ekzilitoj en Egptio. Pro tio la ordono zorgi pri la fremdulo tre gravas.

Krome, en la Nova Testamento, oni asertas plurfoje ke la kredanto estas fremdulo sur ĉi tiu Tero. 1 Petro 2:11 : *fremduloj kaj migrantoj... antaŭ la nacianoj.*

La batalo por nacioj ne estas la nia. Tiu por justeco kaj vero, jes. Kun la armiloj de la fido.
En sia dua numero ĉijara, Gerrit Berveling tradukis parton de la prakristana teksto "La paŝtisto de Hermas", kaj la unua parabolo titolas "La vera civito de la kristano". Estas interese legi ĝin rilate nian temon.
Ĉar *Vi scias, ke vi sklavoj de Dio loĝas en fremda lando, ĉar via civito estas longe for de ĉi tiu civito.*
En kio do la kristanoj engaĝiĝu ? En la amon al la fremdulo, certe. En la akcepton de la ekzilito, certe, laŭ la eblecoj. En la supozatan defendon de nacia kulturo aŭ civilizo kontraŭ aliaj kunhomoj, certe ne.

Kelkaj volas konstrui murojn por disigi, ni partoprenu en la konstruo de pontoj por kunigi la homojn, por atesti pri la donacoj de Dio, kiujn ni ricevas por disdoni.